# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 3 2022

## ENKARCERIGITA LA PERUA PREZIDANTO

La eksprezidanto de Peruo, Pedro Castillo, restos provizore enkarcerigita ĝis la monato junio 2024, laŭ decido de juĝisto. La prezidanto de Peruo, en tiu posteno ĝis la pasinta 7-a de decembro, klopodis eksigi la nacian parlamenton, ĉar tutcerte la leĝo-fara povo aprobus lian elpostenigon. Samtempe, la prezidanto proponis nomumi urĝan registaron.

Tamen, tiu klopodo eksigi la parlamenton ne sukcesis kaj fine, parlamentanoj aprobis la elpostigon de la prezidanto. Post scii pri sia malvenko, Castillo decidis marŝi en la meksikan ambasadejon en Limo, ĉefurbo de Peruo, por postuli politikan azilon, sed li ne atingis eniri en la ambasadejon kaj polico arestis lin.

La prezidanto estas akuzita pri ribelo kaj intenco detrui la konstitucian ordon de la Ŝtato. Parlamentanoj eĉ konsideris, ke la agado de la prezidanto estis klopodo por sukcesigi puĉon en Peruo. Tuj, la vicprezidantino Dina Boluarte estas nomumita de la parlamento kiel nova prezidanto.



Okaze de ŝia unua mesaĝo al peruanoj, la nova prezidanto rifuzis la ideon pri puĉo, ŝi samtempe petis politikan paŭzon por nomumi novan registaron kie povos partopreni malsimilaj politikaj fortoj.

La defendisto de la eksprezidanto Castillo rifuzis antaŭ la juĝisto la plenumon de ebla delikto de ribelo. Tiel, la advokato deklaris, ke estus necese uzi armilojn aŭ aliajn perfortajn agadojn por perfektigi ĉi tiun delikton.

Oni enkarcerigis la eksprezidanton Castillo ĉe la sama malliberejo, kie jam troviĝas alia prezidanto, Alberto Fujimori. Estas necese diri, ke tiuj kvin pasintaj peruaj prezidantoj havis problemojn kun tribunaloj, inter ili Alberto Fujimori kaj Alan García.

# Vorto de la Semajno

## Borso:

Ejo, destinita por regule okazantaj kunvenoj de komercistoj, makleristoj, kasistoj ktp, kiuj tie vendas aŭ aĉetas neĉeestantajn objektojn, precipe valorpaperojn aŭ krudmaterialojn, je kurzo rezultanta el la proporcio de la postuloj rilate al la proponoj

**Borsisto:** Tiu, kiu profesie operacias ĉe borso.

Sinonimo: *Merkato.*

*La spekulaciistoj ofte ludas ĉe la borso, tie ili vendas kaj aĉetas krudmaterialojn.*



Novjorka Borso

## Jam aperis la numero 21-a de Jura Tribuno Internacia !

La pasintan vendredon aperis la numero 21-a de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Espereble, ĝi jam atingis ĉiujn membrojn de la asocio. Memoru, ke la revuo estas dissendata pere de elektronika versio, tamen membroj de la asocio rajtas peti ankaŭ paperan version, se la legado laŭ tiu formato estas pli komforta por nia membroj. Cele al tio, kontaktu kun jurista@esperanto.ac

Ni jam komencas redakti la numeron 22-an de la revuo, kiu espereble aperos antaŭ la venonta monato marto 2023. Ĉu Vi deziras kunlabori kun ĉi tiu projekto?